

La dokumentaj paneloj de la ekspozicio
Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-803/252, k36, 1979 marto 01, 03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni priskribis kelkajn bildajn panelojn de la ekspozicio "Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando" kiu estas vizitebla en la Nacia Biblioteko en Berno ĝis pasko. Hodiaŭ ni provos doni al vi ideon pri alia speco de panelo. Per bildoj oni nur povas prezenti kelkajn aspektojn de la esperanto-dinamismo. Aliaj rimedoj estas necesaj por raporti pri la historiaj momentoj aŭ pri la nuna situacio: tiam aldone al la fotoj tekstaj informoj estas absolute necesaj.

A.- La panelo pri la lingvo-projekto Volapük reproduktas alegorion reproduktitan el volapüka gazeto: anĝelo kun olivbranĉo simbolas la pacon venanta dank' al mondlingvo. Sur libro vi povas legi unu homaro, unu lingvo, sed tio en volapük: menade bal, püki bal.

Cl.- Anĝeletoj ludas kaj legas apud terglobo kaj kelkaj versoj donas ideon pri la skriba aspekto de tiu kvazaŭ sekreta lingvo: pobum vemulo, menade bal, püki bal, nen dem, plo motapük! Super tiu ĉi interesa historia dokumento klarigo diras: "Unua kompleta bibliografio pri la temo "lingvo internacia"" kaj oni vidas reprodukon de du paĝoj de la libro titolita Yelabük pedipedelas aperinta en 1889 en Parizo, tio estas du jarojn post la naskiĝo de esperanto. Kiu atente rigardos tiun ĉi dokumenton fakte malkovros, ke esperanto jam estas registrita pere de la verkoj de Leopold Einstein: Zur Geschichte der Weltsprachlichen Versuche von Leibnitz bis der Gegenwart, kaj La Lingvo internacia als beste Lösung des Weltspracheproblems. Sur la apuda paĝo troviĝas registrita sub la nomo Dr Esperanto (Zamenhof) la diversaj eldonoj de la unua libro kaj de la dua libro de l' lingvo internacia. Noto resendas al la nomo de Leopold Einstein.

A.- En la historio de interlingvistiko ni ne konas multajn same objektivajn organojn. La Jarlibro de la diplomitoj, en volapük Yelabük pedipedelas fakte multe kontribuis al la diskonigo de esperanto kaj de la aliaj tiamaj lingvo-projektoj konkurencaj al volapük.

Cl.- Ni altiras vian atenton al la fakto, ke tiun ĉi jaron Valapük fariĝis centjara. Tiun ĉi jubileon ni markos prezentante al vi kelkajn studojn pri tiu ĉi lingvo, kiu tutcerte pli influis Zamenhof kaj la esperantistojn ol oni ĝenerale imagas. Influo lingva kaj psikologia.

A.- Sed ni revenu al nia ekspozicio. Tre bela panelo titolita "... al maturiĝo de la planlingva ideo" konkludas la historian parton antaŭesperantan. Ovala foto prezentas la portreton de Ernest Naville, tiu doktoro pri filozofio, honora profesoro en la ĝeneva universitato kaj korespondanto de la "Institut de France", kiu, per sia verketo La Langue Internationale aperinta en 1899 vekis simpatian por esperanto ĉe vasta publiko sciencista kaj protestanta en la franclingvaj landoj kaj ĉefe en Romandio.

Cl.- Grafike tre interesa tabulo prezentas la eminentulojn, kiuj partoprenis en 1909 esperantistan festotagon en Soloturno. Super iliaj kapoj cirkaŭ la vorto esperanto flugas ĉielen

rotacianta la idealoj, kiuj movigis tiujn ĉi homojn. Dum la idistoj reduktis sian intereson al lingvaj diskutoj kaj reformprojektoj, la tiamaj esperantistoj interesiĝis pri la ruĝa kruco, la universala klasifiko, la judaj aferoj, tendumado, stenografio, pedagogio, turismo, botaniko, biciklismo, turismo, aŭtomobilismo, korespondado, muziko, poezio, filatelio, ortografi-reformo, internaciismo, socio-reformo, brajla skribo, morsa skribo, kooperado, skoltismo, pacismo, socialismo, bildprojekciado kaj fotado, ktp. ktp. La titolo de tiu ĉi panelo diras: "Esperanton adoptas multflankaj homoj".

A.- La panelo "Arta esprimo en Esperanto" honorigas du svisajn poetojn: Edmond Privat kaj Johano Valano. Apud iliaj portretoj kaj la reprodukto de la dediĉoj de iliaj verkoj Tra 1' silento kaj Malmalice oni povas legi la poemojn Tre dolĉe sur lago kaj Printempo en la Moza Valo. Ni citu la komencon de ambaŭ :

Cl.- Jen la poemo de Privat: Tre dolĉe glitadas boato - Vespere sur lago spegula - Kaj akvo sur ĉiu rembato - Sulkiĝas kun sono regula.

Jen la poemo de Valano: La valo - pala - surmetis - kviete - la veston - festan - kaj majo - gaja - traboris - multflore - la vojon - ĝojan.

A.- La disko de Olivier Tzaut "Tra 1' mondo" kaj la porteto de la mondvojaĝantino Joŝiko Kaĵino spegulas du aliajn aspektojn de la arta esprimo en esperanto.

Cl.- Tre bela panelo estas dediĉita al la internaciaj Esperanto-kongresoj okazintaj en Svislando. Estas listigitaj tiuj ĉi: Universala Kongreso: 2-a 1906 Genève, 9-a 1913 Bern, 17-a 1925 Genève, 31-a 1939 Bern, 32-a 1947 Bern, 64-a 1979 Luzern. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista: 1966 St. Gallen. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj: 1979 Locarno. Kristana Esperanto-Ligo Internacia: 1953 Rüdlingen, 1957 Münchenwiler, 1965 Boldern super Männedorf, 1979 Bienenberg super Liesberg. Sennacieca Asocio Tutmonda, sekcio SAT-Amikaro 1973 Lausanne. Internacia Fervojista Esperanto-Federacio: 1955 Zürich kaj 1972 Lugano. Ĉirkaŭ grandega karikaturito tre impona de Edmond Privat oni vidas la portretojn de famaj kongresanoj el la jaro 1925.

A.- La panelo "Grajnoj en Vento: rimedo por interlernejaj interŝanĝoj" vidigas desegnaĵojn kaj tekstojn de infanoj el pluraj landoj: Japanio, Italio, Nepalo, Francio kaj Britio. El tiu lasta lando ni povas legi poemon de 14-a jara knabo: Se mi posedus tigron - dresitan sekvi min - estus tiel agraba - por akompani lin, ktp.

Cl.- Imponas per mirinda portreto de la psikologo Pierre Bovet la panelo "Svislando kaj Esperanto-instruado. Tiu ĉi afiŝo reproduktas en la franca lingvo parton de konferenco de la direktoro de "Institut Rousseau" kaj prezentas la librojn en kaj pri esperanto, kiujn li verkis.

A.- Ni esperas, ke vi foje havos la okazon vidi tiujn ĉi panelojn. La venontan semajnon ni parolos pri la jubileo de la lingvo Volapük, antaŭulo de Esperanto. Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!